

# La Voĉo de la Kongreso

872  
1.8.1984



ro 1, 31a de julio 1948a

Eldono okaze de la 21a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — Amsterdam 31a de julio — 5a de aŭgusto 1948a

## La pionira laboro de k-do Lanti

Ĉiu nova SAT-Kongreso igas nin bedaŭri la tro fruan forpason de la fondinto kaj gvidinto de SAT, k-do Eŭgeno Lanti (civila nomo: Adam).

K-do Lanti fariĝis por ni simbolo kaj gvidstelo. Lia historia rolo komenciĝas sampaŝe kun la jaroj, kiuj sekvis la unuan mondmiliton. Lanti eklernis esperanton nur dum tiu milito; sed kun akra sia inteligento li tuj komprenis, kian gravan lokon okupas esperante ĉe la nova etapo nun trapasota de la homaro. SAT estis kreata laŭ lia iniciato en la jaro 1921, dum Praga Universala Esp. Kongreso, kun devizo: „For la Neŭtralismon.” Ĝi stariĝis en epoko, en kiu Laboristaj Esperantistoj en sino de la ĝenerala laborista movado konsideris kiel sian devon revoluciece kunhelpi, uzante la komunan lingvon, al realigo de la socialista principo pri mondskala unuiĝo de la proletaro.

La verko de Lanti kaj de la unuaj SAT-pioniroj apogis sin firme kaj senhezite sur la klaskonŝcia laboristaro batalanta en tiuj jaroj, pli arde ol iam, por siaj rajtoj, por sia emancipo. Jam la unua formulo de la asocia statuto difinis klare la pozicion kaj la fundamentajn principojn de SAT. Kaj ĝis hodiaŭ restas netuŝita, ĉar pruvita kiel taŭga por la praktiko, tiu baza leĝo de SAT, kiu havas kiel angulajn ŝtonojn la individuan membrecon kaj la sennaciecan (ne internaciecan!) organizformon.

Ne ĉiam estis facile superregigi la bazan leĝaron en la Asocio. Fremdaj influoj venis flanke de ortodoksaj partianoj, kiuj provis enkonduki en SAT regulojn kontraŭajn al ĝia interna spirito. Felice la sana kerno povis rezisti sukcese tiujn influojn, ne laste pro la persona aŭtoritato de k-do Lanti, pro liaj altpensaj, altmoralaj verkadoj, kiuj aperadis en la SAT-organoj kaj pensigis la meditemulojn inter la anaro.

De kiam anonciĝis la neeblo eviti disputojn kaj skismon en la organizo, de tiam Lanti travivis malfacilajn, zorgoplenajn jarojn; li devis timi pri la sanstato de sia ido, pri ties normala kreskado. Ofte li devis preskaŭ malĉesperi pri la raciemo de la homoj, kies savon el mallumo, malklero kaj nescio li ja tiom arde deziris.

Fine li eĉ alportis la plej grandan, plej dolorigan oferon: por akceli la resaniĝon de la profunde vundita organizo (post deviga ekziĝo de la sovetia membraro), li forlasis sian gvidan poston, retiriĝis por dediĉi sin entute al verkado, kaj fine migradis tra la mondo, vizitante Japanion, Australion, Nov-Zelandon, Usonon kaj Meksikion. La dua mondmilito surprizis lin en Meksiko kaj paralizis lin tie dum longaj jaroj en nemeritita izoleco. Kiam tiu katastrofo fine atingis sian finon, terura malsano estis invadinta

### AMASLOĜEJO

Entute 300 gekamaradoj tranoktos en la amasloĝejo, kiun ni povas uzi kun permeso de la amsterdama urbestro. OKK estas certa, ke ĉiuj kontentos pri la aranĝo. La gekamaradoj, kiuj tranoktas tie, ricevos karton, sur kiu ni stampis per la vorto „pagita” kiom da tagoj oni restos tie kaj kiajn manĝaĵojn oni mendis. Ni petis al k-do v. Essen helpi la domestron aranĝi la diversajn aferojn, do se vi havas demandojn, turnu vin al k-do v. Essen. Sur la karto oni trovas la numeron de la ĉambro, kie oni tranoktos. Ne okupu alian ĉambron. Pro manko je sufiĉe da servistinoj la estro petis la kunlaboron de la kamaradinoj. Antaŭe preparolu tion inter vi, por ke ne regule la samaj tion faru. Dividu la taskon (nur por la manĝado) inter ĉiuj virinoj. Ne malpurigu la ĉambrojn.

kaj grave turmentanta lian korpon: malsano de tropiko. Laste tumoro je cerbo tiagrade suferigis lin, ke li decidis memvole ĉesigi sian vivon, en aĝo de 67 jaroj.

Ni staras tro proksime ankoraŭ de tiu dato, por doni hodiaŭ jam definitivan prijuĝon pri la dinamiko de la Lanti-a kreaĵo. Ni certe scias, ke li troviĝis ĉe la avangardo de la homaro, ke li iniciatis ion nepereigeblan, ke li, profundpensa filozofo, profete anticipis la estontan homaran socion, kies embrion li deziris ekfunkciigi prove en la kadro de SAT.

Nuntempe ni rikoltas la fruktojn de lia semado. Ni aplikas liajn konsilojn kaj instigojn, esperante ke la tuta laborista movado en la mondo profitos el nia agado. Ankoraŭ mallumaj nuboj pendas minace super la horizonto kaj nigra makulo ŝajnas la tuja estonteco. Sed provante mem ĉiutage liberigi nin el naciecaj antaŭjuĝoj, ni iom post iom kreas la garantion por finfina efektiviĝo de nia SAT-idealo en socie transformita mondo. N. BARTELMES.

La gekamaradoj, kiuj per biciklo iros al la amasloĝejo, trovos ĉe la alia flanko de la kanalo biciklejon.

### DISTRIBUAD-KUPONOJ

Ĉiuj eksterlandaj gekamaradoj ricevos de la distribuadservo diversajn kuponojn por aĉeti nutraĵojn. Se oni mem volas preni la kuponojn, oni iru al la Distribuadservo por eksterlandanoj, Singel 451-453, Amsterdam-C. La oficejo estas malfermita de la naŭa ĝis la dek-sepa. Sabaton ĝis la dektria. Tie la fremdulpolicistoj stampos la pasportojn kaj en la sama ĉambro oni ricevos la distribuadkuponojn. Ni ankaŭ povas kolektive aranĝi tion. Oni donu la pasporton ĝis lundmateno en la akceptejo, ĉe la tablo „Distribuadservo”. Posttagmeze oni ricevos la pasporton kun distribuadkarton.

# Programo

por la kultura vespero je la 1a  
de aŭgusto vespere je la 7.30a  
en la kongresejo

- Malfermo:**  
*Muziksocieto „Forzando“:*  
La Espero  
Salutparoladoj
- Muziksocieto „Forzando“:**  
La Mutolino de Portici, d' Auber
- Baletgrupo:**  
Kion floroj sonĝas, S. Translateur  
*Muzikgrupo:*  
Humoresko, A. Dvorák  
Munehrer Kindl, Karl Komzak  
*Baletgrupo:*  
Suite Balet, Fr. Popy  
a. Entree Mazurka, b. Pizzicati, c.  
Valse Lente, d. Largo, e. Final  
Galop
- Riek Hippe—Tendeloo, aldo-kantistino:**  
Majfloroj, Nederlanda popolkanto  
Ho, kara vi, Giordani  
Bolero, Hispana popolkanto  
Ŝafpaŝtineteto, 18a jarcento  
Paŭzo
- Muzikgrupo:**  
Plezuro de la amo, C. B. Martini  
Marborda idilo, Oscar Tehas
- Baletgrupo:**  
Vino, virino kaj kantado,  
Johann Straus  
*Riek Hippe—Tendeloo, aldo-kantistino:*  
Gejunuloj, Venu for!  
Al muziko, Fr. Schubert  
Dum la kara panjo, Ant. Dvorák  
Mi amas vin, Edo Grieg
- Muziksocieto „Forzando“:**  
Sinfonio, Joh. Chr. Bach  
(hobosolo de s-ro J. Harshagen Jr.)
- Fermo**

## Kantoj de Riek Hippe:

### MAJFLOROJ

(Nederlanda)

La roso elĉiela falis sub fenestret'  
De l'amatino plej bela, En ŝia ĝardenet';  
Ŝi kaptis mian koron, Danĝere vundis ĝin,  
Tuj ĉesus la doloro, Se ŝi konsolus min.

Printempo komenciĝas, ĉe mia virtulin'  
La folioj verdiĝas, La floroj montras sin  
Jen en la verda valo Volonte restas mi,  
Jen kantas la najtingalo, Kaj multaj  
birdetoj pli.

Mi volas nun deŝiri Majflorojn de l'arbet';  
Al amatino diri, Antaŭ la fenestret';  
Nun kara, volu veni, Antaŭ la fenestret',  
De mi la florojn preni, De l'bela majarbet'.  
(Esperanto de J. Ziermans)

## HO, KARA VI

(Itala)

Ho, kara vi, KREDU al mi,  
Sen via am', Velkas la kor'.  
Mia ador' Iras al vi,  
Nun en favor' Venu al mi.

(Esperanto de J. Ziermans)

## BOLERO

(Hispana)

Al blinda knab' mi sentis  
Koran kompaton.  
Mi kortuŝite helpis  
La nehelpaton.  
Kaj jen la fino:  
Li iĝis revidanta-  
Kaj mi blindino

(Esperanto de Paul Bennemann)

## ŜAFPAŝTINETO

(Franca) 18a Jarcento

Ŝafpaŝtineteto, Vi ĉarmbelulin',  
Ardiĝas, flamiĝas, Sed ne amas nin.  
Bela kaj ribela, Ĉarma estas vi;  
Aroganta, vanta, Vi mokas je ni,  
Vi kantas, vi vantas, Pri am' kaj anim'  
Paroloj frivolaj, vi amas nur vin.

(Esperanto de J. Ziermans)

## GEJUNULOJ, VENU FOR!

(Angla) H. Purcell

Gejunuloj, venu for! (Ho venu for!)

Ludu ni kun gaja kor'!

Ĉar jen. Estas florofesta hor';

Sankta al amo kaj ĝojem',

Al danco, muziko, kaj al poezi'!

La ŝafoj nun sin paŝtu mem,

Dum kantos vi en harmoni'.

(Esperanto de M. C. Butler)

## AL MUZIKO

(Germana) Fr. Schubert

Vi ĉarma art'; en malĝojiga horo,

Kiam la brua viv' katenis min,

Per varma am' plenigis vi la koron,

Transportis en pli bonan mondon min,

Ja en pli bonan mondon min!

Kaj ofte kiam via liro sonis,

Per ĝemo aŭ per dolĉa melodi',

Ĉielon de pli bonaj tagoj donis,

Vi ĉarma art', vin kore dankas mi,

Vi ĉarma art', mi dankas vin!

(Esperanto de J. Ziermans)

## DUM LA KARA PANJO

(Anton Dvorák)

Dum la kara panjo min kanti instruis,

El ŝiaj okuloj larmoj ofte fluis,

Nun kiam l'etulojn pri kant' mi stimulas

Laŭ bronza vizaĝo ankaŭ larmoj kiel perloj

sin rulas.

(Esperanto de Adr. Kloek)

## MI AMAS VIN

(Dana)

Edv. Grieg

Ho, vi dolĉega mia vivespero,

De mia kor' unua revo vi;

Mi amas sole vin sur tiu tero,

Mi amas vin nun, kaj eterne plu!

Nur vin memoras mi en ĉiu horo,

Pri via bona sort' nur pensas mi;

Ĉu ridos ĝoj' aŭ frapos nin doloro:

Mi amas vin nun, kaj eterne plu!

(Esperanto de Zanoni)

## LA ENIRO DE NIA KONGRESEJO

estás Leidschekade. Nur dimanĉe de  
la 9.— ĝis la 12a la eniro de nia kon-  
gresejo estas Marnixstraat 400.

## LA ADMINISTRADO DUM LA KONGRESO

Per la kongreskarto ni klopodas pli-  
faciligí la administradon. Per la men-  
diloj oni povas anonci sin por la eks-  
kursoj. Oni devas tuj pagi kaj ricevas  
stampon sur la unua parto kaj tiu ĉi  
parto valoras kiel vojaĝbileto. Ni  
petas al la kongresanoj, anoncu vin  
ne lastmomente, ĉiuj kunlaboru!

La voĉdonado dum la kongreso (do  
nur por SAT-anoj) se necesa, okazos  
per slipoj. Tiamaniere ni certe ĝajnos  
multe da tempo kaj evitos malagra-  
blajojn, kiuj kelkfoje okazis. Kom-  
preneble nur SAT-anoj ricevas kon-  
greskartojn kun voĉdonslipoj. Por  
partopreni al la diskuto, la parolontoj  
montru la verdan aŭ bluan (tag)kar-  
ton. La voĉdonkomitato eventuale  
kontrolo tion. Per tiu ĉi sistemo la  
SAT-anoj kaj la ne-SAT-anoj povas  
sidi en la sama salono. Ni esperas, ke  
ĝi sukcesos.

## OFICIALA AKCEPTO FARE DE LA URBESTRARO

Bedaŭrinde ni devas sciigi, ke nur 300  
gekamaradoj povos ĉeesti, pro manko  
je spaco. La urbestraro ĉi tie ne dis-  
ponas pri granda salono por akcepti  
ĉiujn kongresanojn. OKK havis gra-  
van taskon decidi kiuj povos ĉeesti.  
Nur la gekamaradoj, kiuj havas kon-  
greskarton kun litero „U“ sub la  
SAT-matrikulo, povos partopreni.  
Tiuj ĉi gekamaradoj kolektiĝu lundon  
la duan de aŭgusto je 19.45 antaŭ la  
kongresojo. Kune ni promenos al la  
Urba Muzeo, kie okazos la akcepto.

## BOATEKSKURSO TRA LA KANALOJ

Ankaŭ la nombro da partoprenontoj  
por tiu ĉi ekskurso estas tro granda;  
ni do estas devigataj dividi ilin en tri  
partojn, du por lundo vespere, la tria  
por merkredo vespere.

La gekamaradoj, kiuj havas kongres-  
kartojn kun kupono por la boateks-  
kurso kun litero „A 1“, partoprenos  
al la unua boatekskurso je lundo ves-  
pere. Precize je 19.— la boatoj for-  
veturos de Rokin.

La gekamaradoj, kiuj havas kartojn  
kun litero „A 2“, partoprenos al la  
dua boatekskurso, ankaŭ je lundo  
vespere. Precize je 20.15 la boatoj  
forveturos de la kanalo antaŭ nia  
kongresejo.

La gekamaradoj, kiuj havas kartojn  
kun litero „B“, partoprenos al la tria  
boatekskurso je merkredo vespere.

Precize je 19.— la boatoj forveturos de Rokin.

Ekskurso „A 1” finiĝos antaŭ nia kongresejo, ekskurso „A 2” je Rokin kaj ekskurso „B” antaŭ nia kongresejo.

### EKSKURSOJ JE MERKREDO POSTTAGMEZE, LA 4an DE AŬGUSTO

Al kelkaj ekskursoj nur malmultaj ĝekamaradoj povos partopreni, nome al No. 2 Haka nur 75 ĝekamaradoj kaj al No. 7 Bierfarejo nur 40.

Pere de la aliĝilo, kiun vi trovos en la kongresmapo, vi sciigu al OKK, al kiu ekskurso vi deziras partopreni. Metu la aliĝilon en keston, kiun vi trovos en la akceptejo. Nur por ekskurso 2 kaj 7 vi samtempe demandu al la kunlaboranto staranta ĉe la kesto, ĉu ankoraŭ estas eble partopreni. La vojaĝ- aŭ enirprezon de kelkaj ekskursoj vi pagu al ĝia ĝvidanto.

La partoprenontoj al ekskurso 1 kaj 2 kolektiĝu merkredon je la 12a antaŭ la kongresejo „Bellevue”, ĉar la vagonaro forveturos je la 12.43. Ankaŭ por la aliaj ekskursoj oni kolektiĝu antaŭ la kongresejo, nome je la 13a horo post la tabulo, kiu portas la numeron de la ekskurso, al kiu oni deziras partopreni. Por pluraj komunikoj vidu la tabulojn en la kongresejo.

### LABORISTA UNIVERSITATO

Merkredon la 4an de aŭgusto matene je la 9a horo en la kongressalono:

#### Programo

K-do G. Waringhien: La Idisma krizo kaj ĝiaj instruoj.

K-do v. d. Starre: Bellamy-ekonomio.

### RADIO-ELSENDO

VARA, merkredon, la 4an de aŭgusto, je 19.00—19.15. Momentoj el la SAT-kongreso.

### KONGRES-BICIKLEJO

Ne estas eble, meti la biciklojn antaŭ la kongresejo. En la proksimo, nome „Leidscheplein 18” vi trovos biciklejon. Ankaŭ dimanĉon ĝi estos malfermita dum kelkaj horoj, nome matene de 8.30 ĝis 9.30, tagmeze de 11.30 ĝis 12.30, 13.30 ĝis 14.—, 16.— ĝis 16.30 kaj vespere de la 19.— ĝis 23.—. Se oni intencas regule meti la biciklon tie, jam diru tion sabaton la 31an de julio al la estro de la biciklejo.

### LA LASTA TRAMO

forveturos je la 23.00a de ambaŭ finstacioj.

EN LA DUA N-RO DE „LA VOĈO DE L' KONGRESO” APEROS KOMUNIKOJ PRI LA EKSKURSOJ JE JAŬDO KAJ VENDREDO.

## KATALOGO de la S.A.T.-ELDONOJ

Adreso: Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, Paris-20.  
Por Nederlando: C. v. Essen, Floretstraat 10, Roterdamo-Z.

La livero okazas nur post pago. Prez-ŝanĝo estas rezervata.

Rabato: membro de SAT rajtas je rabato da 20%, sed nur por unu ekzemplero de ĉiu speco.

Afranko: ĝin pagas la kliento. Proksimume 20% el la prezo, plus ev. registrado f 0.15.

Vortoj de k-do Lanti: 192 pĝ. ....	f 1.—
Leteroj de E. Lanti: 280 pĝ. ....	f 2.—
Naciismo: 124 pĝ., de E. Lanti .....	f 0.75
For la neŭtralismon: 32 pĝ., de E. Lanti .....	f 0.25
Skizo pri filozofio de la homa digno, 148 pĝ., de P. Gilles, trad. Lanti	f 1.—
Diablidoj: 48 pĝ., de N. Bartelmes .....	f 0.60
Juneca ardo: 120 pĝ., de N. Bartelmes .....	f 1.—
Vartejoj: 130 pĝ., de N. Bartelmes .....	f 1.15
Petro: 116 pĝ., de N. Bartelmes .....	f 0.75
Unua legolibro: 104 pĝ., de N. Bartelmes .....	f 0.75
La Laborista Esp. Movado antaŭ la Mondmilito, 36 pĝ., de G. P. de Bruin .....	f 0.50
Fremdvortoj en Esperanto: 64 pĝ., de P. Nergard .....	f 0.50
Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso, 58 pĝ., de P. B. Nergard .....	f 0.50
Jimmie Higgins: 372 pĝ., de Upton Sinclair .....	f 1.50
La Fera Kalkanumo: 368 pĝ., de Jack London .....	f 2.—
La brava soldato Ŝvejk: 154 pĝ., de J. Hašek .....	f 1.25
Kristanismo kaj patriotismo: 112 pĝ., de Leono Tolstoj .....	f 0.50
Al la junuloj kaj biografio, 54 pĝ., de Petro Kropotkin .....	f 0.40
La kom. manifesto: 56 pĝ., de K. Marks .....	f 0.40
Komentoj al la kom. manifesto: 56 pĝ., kompilo de T. Weder ..	f 0.40
Skizo de ekonomia geografio: 134 pĝ., 45 kartoj, de J. F. Hora- bin, .....	f 2.—
Librecana socio: 54 paĝoj, de G. Bastjan .....	f 0.35
Frateco en la vivpraktiko: 28 pĝ., de H. Roland-Holst .....	f 0.10
Manifesto de sennaciistoj, 32 pĝ., eldono originala en Esperanto elĉerpita; la sama en franca lingvo .....	f 0.25
la sama en angla lingvo .....	f 0.25
Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?: 52 pĝ., de E. Lanti k Ivon	f 0.50
La forto de la fortaj: 20 paĝoj, de Jack London .....	f 0.10
Fabeloj de Herminja zur Muhlen, 56 pĝ., .....	f 0.35
Ili: 80 pĝ., originalo de L. Bergiers .....	f 0.75
Prologo: 64 pĝ., de E. Miĥalski .....	f 0.35
Poemo de l' Plugisto: 56 pĝ., de Hrima .....	f 0.35
Nia teatro: 64 pĝ. ....	f 0.40
La Profeto: 32 pĝ. ....	f 0.10
La kemio de l' Universo: 80 pĝ., de A. Forsman .....	f 0.35
La vojo al scienco de estonto: 56 pĝ., de A. Forsman .....	f 0.35
Fronto kaj postfronto en Aragonio: 80 pĝ., de Prats .....	f 0.50

★

### Ankaŭ akireblaj en la Kongresa Librovendejo:

La Senlingvulo, de V. Korolenko, trad. M. Ŝidlovskaja. 190 p., bindita f 2.90, broŝ. ....	f 2.50
Homoj en Milito, de Andreas Latzko, trad. K. Minor. 190 p., bindita broŝ. ....	f 2.90
Fontamara, de I. Silone, trad. A. Anĝelo kaj J. van Scheepen. 190 p., .....	f 2.50
Kulio, de M. H. Szekely Lulofs, trad. J. Makkinje. 184 p., bindita broŝ. ....	f 2.90
La Hispana Tragedio, de Jef Last, trad. G. J. Degenkamp. 188 p., nur bindita	f 2.90
Neĝulino kaj aliaj fabeloj de Fratoj Grimm. trad. Kabe, bele ilustrita de A. Langeberg, bindita .....	f 1.50

# La beginejo

Troviĝas en Amsterdamo multaj kortetoj en kiuj multaj maljunuloj, precipe virinoj, ĝuas senzorgan vivovesperon. Kvazaŭ oazoj ili kuŝas en la malnova parto de la urbo kaj atestas pri la bonfaremo de la estintepoka riĉularo. Sed ili verŝajne estis tiel bonfaremaj por trankviligi sian konsciencon kaj doni al Dio bonan impreson pri sia pieco. Ekzistas en la urbo multaj de tiuj kortetoj, kiuj portas la nomojn de konataj regentoj kaj komercistoj. La beginejo, troviĝanta en la koro de la malnova urbo, diferencas de ĉiuj aliaj kortetoj pro origino, historio kaj dimensio.

Fondite en la jaro 1346a la korteto iom post iom plivastiĝis. Dum la reformacia maltrankvilo ĝi povis sin teni en la urbo kiel ŝirmita insuleto. La magistratoj ne volis ĝeni la malnovajn kutimojn de la piaj virinoj, grandparte siaj propraj fratinoj, filinoj aŭ onklinoj; ili ja formortus el si mem. Sed ili ne formortis, male, en la interno de la sendanĝera beginejo ĝuste ekscitis la fajreto kaj plifortigis. Al tio ni dankas la pluan ekzistadon de tiu kvieta loko, proksime de bruo de la ĉeturbo.

\* \* \*

Venante el la homplena Kalverstrato tra la Beginstrateto oni atingas la antikvan enirpordon kaj devas nur malfermi ĝin por postlasi al si la bruon de la mondo kaj esti ensorbata en la sfero de la korteto.

Enirante la Beginejon, oni atendas vidi malgrandajn dometojn en la mezepoka sfero. Sed estas tute alie. Sepdek- kaj okdek-jarcentaj domoj ĉirkaŭas la korton, tri kaj kvar etaĝojn altaj, konstruitaj per brikoj kaj kun sonoril-, kol-, aŭ tub-fasadpintoj. Ĉirkaŭ la antaŭgardenetoj troviĝas lignaj bariloj. Tial la sfero estas certe deksepjarcenta kaj eksterordinare amsterdama. Tiel okazas, ke ĉi tiu korteto inter la konataj beginejoj en la malnova mondo estas konsiderata kiel unika. La korlo-kapeleto, staranta en la mezo, ne plu apartenas al la beginoj. Jam en la jaro 1607a oni transdonis ĝin al la Angla Presbiteriana eklezio, kiu ĝis nun utiligis ĝin.

Tuj post oni eniras la pordegon, oni vidas tomboŝtonon en la defluo de la preĝejo-vojeteto. Strange estas, ke ne troviĝas sur ĝi iu ajn indiko. Tie ĉi ni staras antaŭ la tombo de peka begino. Kvankam estas pli bone paroli pri eksterordinare pia begino. Cornelia Arens, kiel ŝi nomiĝis, submetis sin dum la lastaj 33 jaroj de sia vivo kiel begino al la reguloj de la korteto. Evidente ŝi ne trovis en tio feliĉon kaj kontentigon, ĉar ŝi suferis pro sia familio kiu forlasis la veran kredon. Por pentofari ankaŭ post sia morto, ŝi elparolis la deziron ke oni enterigu ŝin en la defluo de la korteto. Sajnas, ke tio komence ne okazis. Cornelia estis enterigata la 22an de oktobro 1654a en propra tombo en la Angla preĝejo. Poste oni plenumis sian deziron. En la jaro 1732a la skeletostoj estis metataj en ĉi tiu tombo.

Post la perdo de sia kapelo, la beginoj kolektiĝis por komuna preĝo en la domo kun ligna fasado je no. 34a poste en no. 31a en la nuntempa preĝejo. Tiu preĝejo komence havis la aspekton de ordinara domo; ĉar ne estis permesate al la katolikanoj havi publikajn preĝejojn. Tiu preĝejo transprenis la taskon de la antaŭa sankta loko kaj nomiĝis la nova sankta loko en kiu la katolikanoj konfesis sian antikvan kredon pri la altsankta sakramento.

La plej okulfrapa domo estas tiu kun la ligno fasado no. 34. Tiu fasado, kune kun la fasado sur la Zeedijk no. 1, estas la nuraj konservitaj ekzemploj de lignaj fasadoj en Amsterdamo. En la deksepa jarcento post kelkaj bruleĝoj kiuj detruis preskaŭ la tutan urbon, la urbestro malpermesis la konstruadon de lignaj domoj. Kiam ni promenas tra la korteto belaj fasadpintoj kaj beletaj fasadŝtonoj okulfrapas nin.

Ne ĉiuj de la nuntempaj enloĝantinoj estas beginoj, multaj estas vidvinoj aŭ fraŭlinoj. Nur en la domo „Bethanie” ankoraŭ loĝas kelkaj beginoj, nun vestitaj kiel monahinoj.

\* \* \*

La korteto estas fermita je la 22a kaj ankoraŭ nun oni trovas sub la alia enirpordeto sur la Spui, figuritan malnovan ordonon. La apogiloj tie montras en reliefo forpaŝetantan kokon, forkurantan hundon kaj kurantan knabon por memori, ke por eviti bruon ne estas permesate havi kokojn hundojn kaj infanojn en la korteto.

Ankaŭ estas malpermesate, ke sen konsento de mastrinoj tranoktas amikinoj de la beginoj kaj tute ne knaboj pli aĝaj ol 3 jaroj. La nura vira enloĝanto estas la rektoro, samtempe dekanato de la preĝejo.

La Beginejo havas propran sferon, kiu apartenas al antaŭaj jarcentoj, kiu agrable tuŝas nin kaj de kiu ni, dum niaj vagadoj tra la malnova urbo, volonte iom ĝuas.

Foje iu admiranto de korteto komparis ĝian situon en la urbo kun serioza paĝo en libro, plena de ŝerco kaj humoro. Poca paĝo ĝi certe estas.

Joh. Beket.

## FRAKCIAJ KAJ FAKAJ KUNVENOJ

Je lundo posttagmeze okazos frakciaj kunvenoj de

Sennaciista frakcio  
Pacifista frakcio  
Liberecana/Anarkista frakcio  
Komunistema frakcio  
Socialdemokrata frakcio  
Klasbatala frakcio  
LEA-Komitato

Je mardo posttagmeze okazos:

Jurnalista faka kunveno  
Kunveno de JuKo  
Instruista faka kunveno  
Poŝtista faka kunveno  
Graŭika faka kunveno  
Kunveno de Instrua Servo  
Kunveno de LEA-Komitato  
Kunveno de Bellamy frakcio

## POR EJO KAJ HORO VIDU LA TABULOJN EN LA AKCEPTEJO

La fervojistoj aranĝos mem sian fakan kunvenon en konstruaĵo „De Leeuw”, Valkenburgerstraat 149, Amsterdam-C.



La plej silenta loko en la plej brua kvartalo...  
Begijnhof (Beginejo)

Cliché V.V.V.

# La Voĉo de l' Kongreso

N-ro 2, 3a de aŭgusto 1948a

Eldono okaze de la 21a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda – Amsterdam 31a de julio – 5a de aŭgusto 1948a

## Solena malfermo de nia 21a

Dimanĉon posttagmeze je la dua horo nia kongressalono estis plenplena. Ne mirige, ĉar baldaŭ komenciĝus la oficiala malfermo de nia 21a SAT-kongreso. Ĉeestis pli ol mil kamaradoj el ĉiuj partoj de l' mondo kiam la prezidanto de la OKK, k-do Faulhaber, elparolis sian malferman paroladon. Sed antaŭ ol tio okazis la kongresanaro leviĝis de la seĝoj kaj kantis „La Espero”. Estis solena, neforgesebla momento. Nova, grandioza paĝo aldoniĝis al la historilibro de SAT. Ni nur devis bedaŭri, ke niaj kamaradoj el Germanio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio kaj kelkaj aliaj landoj ne akiris permeson veni ĉi tien por kune kun ni travivi tiujn belajn momentojn. Sed kiel unu el niaj kamaradoj en la kongreso diris, ni esperas saluti vin, senrajtigitojn, en nia sekventa, nia 22a kongreso!

Ĉeestis en nia unua kunsido pluraj oficialaj personoj, el kio montriĝas kreskanta simpatio por nia laborista Esperantomovado. Du skabenoj reprezentis la amsterdaman komunumestraron. Estis s-ro De Roos kaj s-ro Franke. Troviĝis ankaŭ en la kongressalono anoj de nia honorkomitato: s-roj Blokzijl, prof. dr Mannoury kaj Schermerhorn kaj la konata batalantino por libera Hispanio, k-dino Alma-Heijnen. Plue ni nomu la reprezentanton de la Nederlanda Asocio de Sindikatoj (NVV), s-ro H. Korte. Kaj ni povus nomi ankoraŭ multajn aliajn, sed ni devas atenti la amplekson de nia kongresgazeto.

\*\*\*

Post la malfermo parolado de k-do Faulhaber (vidu paĝon 6) s-ro Franke kiel anstataŭanto de la amsterdama urbestro, unue bonvenigis la kongreson. Li atestis pri la granda simpatio de la urbestro por nia afero, simpatio, kiu montriĝas ne el nuraj vortoj, sed ankaŭ el agoj. Ĉar la urbestro i.a. decidis nomi Zamenhofstraton kaj ĝi ankaŭ decidis instrui Esperanton fakultative en la nova liceo.

Jen kamaradoj, tio jam estas bona komenco!

Se ĉiuj oficialaj reprezentantoj estus liberaj paroli tiom longe kiom ili deziris, ni havus kongreson, konsistantan nur el salutparoladoj. Tial la prezidanto de la OKK devis limigi la paroltempojn de la reprezentantoj je du minutoj por ĉiu. Saĝa decido!

Memorigi ĉiujn salutparoladojn ĉi tie ne eblas, ni do prenu nur kelkajn, kiujn plej multe trafis nin.

Unue la parolado de k-dino Alma-Heijnen, kiu petegis nin ne forgesi la hispanajn kamaradojn, batalantajn por sia liberigo. Due s-ro Schermerhorn, kies kuracisto malpermesis al li lacigi sin, sed kiu tamen venis al nia kongreso por diri kelkajn vortojn.

„... Mi estas kontraŭ ĉiu naciismo. Por mi ne ekzistas francoj, angloj, nederlandanoj... Ni ĉiuj estas homoj, nur homoj. En tiu senco ni eduku niajn infanojn. Esperanto en la lernejojn!” Tiel parolis la 82-jara Schermerhorn. Prof. dr Mannoury atentigis pri alia bona eco de Esperanto.

S-ro J. v. d. Meulen salutis nin nome de la nederlanda unuiĝo de liberpensuloj „De Dageraad”. Li esperis, ke baldaŭ falos la lingvobaroj inter la popoloj, kaj ke ni forigu ankaŭ aliajn barojn, katenantajn la homan spiriton. „Karaj kunŝtatoj”, kiu alia tiel alparolus nin ol s-ro Kalma, la reprezentanto de la neŭtralaj esperantistoj nederlandaj? Kaj efektive ni ŝvitis, ĉar estis varmege en nia kongressalono.

Konstruktivan ideon proponis Theo Jung, la redaktoro de „Heroldo”. Se ni foje aranĝus komunan kongreson de la tuta Esperantistaro, de UEA, de SAT ktp.... Restu ankaŭ la apartaj kongresoj, ĉar ili havas apartajn avantaĝojn. Pripensinda!

Karaj reprezentantoj kaj parolintoj, pardonu al ni, ke ni ne citas ĉi tie ĉiujn viajn vortojn, kiom ajn valoraj ili estas. Granda estas nia vortfluo, sed nur malgranda nia kongresgazeto. Al ĉiuj kiuj deziris sukceson al nia 21a ni esprimas nian sinceran dankon! Post la salutparoladoj la prezidanto de la OKK transdonis la martelon al k-do Bannier, ano de la plenumkomitato, kiu ekprezidis la kongreson.



Ĉu Volendamanoj? Ne, junaj k-doĵ, kiuj prezentis dancojn en nia interfratigvespero!

# Faulhaber bonvenigas la kongreson

Regis granda silento en la kongressalono kiam k-do F. Faulhaber dimanĉon posttagmeze en la nomo de la OKK bonvenigis la kongreson. Lia parolado sekvas ĉi sube. Ĝi meritas nian plenan atenton.

## KARAJ GEKAMARADOJ!

En la nomo de la Organiza Komitato mi kore bonvenigas vin en Amsterdam, la ĉi jara urbo de nia ĉiujara kongreso.

Kun sopiro ni ĉiuj atendis ĉi tiun tradician manifestadon de nia idealismo, de nia fido pri la estonteco kaj de nia kredo pri pli bona kaj pli bela socio.

Ĝojiga estis por ni la momento, kiam, enirinte la kongresejon, ni revidis malnovajn kamaradojn kaj konatiĝis kun novaj por komune labori por la afero, al kiu ni dediĉis nian vivon.

La grandnombra aliĝo al nia kongreso pruvas, ke nia espero pri tutmondaj unueco, solidaro kaj libero ne pereis en la furiozantaj ondoj de l' naciismo kaj interpopola malamo, kiuj en la lasta jardeko tiom kruele turmentis la homaron, silentigante ĉiun „vokon de l' raci“.

La mondo ankoraŭ prezentas grandan haoson. La paco, kiun ni tiom arde esperis post la terura buĉado, ankoraŭ ne venis. La vivo estas ankoraŭ plena je problemoj, kies solvo postulas superhoman forton kaj nestingeblan idealismon.

Tri jarojn post la liberiĝo ankoraŭ miloj da senkulpaj homoj sopiras la liberecon kaj la valoro de homa vivo ankoraŭ ne multe plialtiĝis.

Ĉu la homaro progresas aŭ malprogresas? Jen demando, kiun ni vole-nevole faras al ni.

Pesimistoj rigardas nur la nubojn kaj antaŭdiras la plej teruran estontecon. Kontraŭe optimistoj vidas krome kelkajn radiojn da lumo, kiuj trapenetas, donante al ni esperon kaj fidon. Ja en ĉiuj rondoj levigas voĉoj — ankoraŭ ne fortaj — insistantaj pri tutmondigo de la mastrumado kiel la sola solvo de la nuntempaj problemoj. Vortoj kiaj mondregistaro, tutmonda federacio de ŝtatoj, kaj similaj, enkorpiĝas la saman ideon.

Sed neniu ideo povas akceptiĝi, se la tempo por ĝi ne estas matura.


Nekontesteble la kapitalisma malordo solviĝos en socialisma direkto. La pli kaj pli akriĝanta situacio en la internacia ekonomia vivo finfine devigos la mondon forskui de si la kapitalisman kaj naciisman sistemon por akcepti en iu ajn formo tutmondan regadon, tutmonde reguligitan ekonomion, unuvorte: la tutmondisman, por ke neniu popolu povu esti la ludilo de alia kaj por ke regu la vera libero.

Jam oni komencas konscii, ke la nacioj ne povas plu resti disaj kiel apartaj kaj sendependaj unuoj, sed ke ili devas en sia propra intereso iel unuiĝi.

Neniu ideo — mi diris — povas akceptiĝi, se la tempo ne kreis por ĝi la necesajn kondiĉojn, kaj tio validas ankaŭ por la ideo de lingvo internacia. Ju pli oni komprenas la neceson de racia tutmonda mastrumado, ju pli la tekniko progresos kaj venkos la limojn de niaj ĝisnunaj kapabloj, — des pli oni sentos la bezonon transponti unu el la plej larĝaj kaj plej profundaj abismoj inter la popoloj, nome la lingvan diversecon.

La klopodoj por solvi la nuntempajn problemojn laŭ tutmonda skalo trovas en la babeltura haoso obstaklon, kiu devigos la mondon vole-nevole okupi sin pri la lingva demando.

Malgraŭ la pli akriĝinta naciismo, malgraŭ tio, ke la mondo post la lasta milito ankoraŭ pli multe dividiĝis, la ideo pri internaciigo aŭ tut-



*Juĉdon ni ekskursos i.a. al la nederlandaj altfornoj kaj ŝtalfabrikejoj en IJmuiden.*

*Cliché V.V.V*

mondigo de nia vivado rompas al si vojon, samokaze kreante la kondiĉojn por la akcepto de Esperanto.

Kiel anoj de la socialisma ideo ni ĉiam komprenis, ke la mondo nepre evoluos laŭ tiu vojo, kaj pro tio ni konservis nian idealismon, eĉ tra la malfacilaj jaroj de du mondilitoj.

Kvankam unuflanke la individua interesiĝo pri nia afero ankoraŭ ne atingis la nivelon antaŭmilitan, kaj verŝajne dum longa tempo ne atingos ĝin, ni vidas aliflanke interesiĝon ĉe registaroj kaj aliaj aŭtoritatuloj, pro kio plifortiĝas en ni la espero pri venko ne tro malproksima.

Tial ni ne perdas la paciencan kaj entuziasman partoprenon niajn kongresojn, en kiuj ĉiujfoje denove realiĝas — kvankam malĝrandskale, tamen ne malpli reale — unu el la plej revoluciaj revoj de la profetoj de l' homaro. Ĉi tie ja malaperas la distancoj, fornebuliĝas la limoj. Ĉi tie nia membro el la plej ekstrema angulo de nia planado evidentiĝas kvazaŭ najbaro nia, loĝanta en la sama strato, eĉ en la sama domo. Ĉi tiu fakto donas al la devizo de Marx „Laboristoj ĉiulandaj unuiĝu!“ signifon pli konkretan. En niaj kongresoj ni sentas nin efektive interligitaj.

Tial ni tiom pli ĉagrene sentas la foreston de diverslandaj gekamaradoj, por kiuj la Organiza Komitato vane klopodis akiri permeson por eniri Nederlando.

Neniu scias pli bone, kiom granda estas ilia deziro viziti nian kongreson, ol la Organiza Komitato, kiu dum monatoj interŝanĝis kun iliaj perantoj leterojn, urgajn leterojn, eĉ telegramojn. Sed sensukcese: la espero, kiun ni ricevis en la komenco de nia penado, poste tute detruigiĝis per nova decido de la koncerna ministro, kaj ni havis la malagrablan taskon seniluziĝi ilin.

En kelkaj landoj niaj anoj ne sukcesis akiri permeson de sia registaro por forlasi sian landon.

El ĉi tio evidentiĝas, ke la libereco, tiom bele prikantata en diversaj landoj, estas ankoraŭ tre relativa afero. Jam parolante pri la laboro de la Organiza Komitato, mi ne povas ne menciigi niajn klopodojn pri la gastigado.

La gastigado estas la unua kondiĉo por sukcesi kongreson. Facile estas proponi, ke la kongreso okazu en Amsterdam — malfacile estas plenumi decidon.

Same kiel en aliaj urboj en ĉi tiu kaj en aliaj landoj, ankaŭ en Amsterdam regas granda manko je loĝejoj. 25000 familioj loĝas ĉe siaj parencoj aŭ ĉe aliaj homoj, per tio forprenante loĝlokon al niaj kongresanoj.

Al tio aldoniĝas fakto, kiun ni tute ne antaŭvidis, kiam oni prezentis la proponon en Aarhus: ĝuste en la tempo

de nia kongreso komenciĝos la festoj pri la jubileo de l' reĝino, pro kio la fremdultrafika oficejo insiste konsilis al ni prokrasti la kongreson al la sekvonta jaro, ĉar sendube neniu loko en hoteloj tiutempe estos libera.

Koncerne gastigadon ni no devis kalkuli nur je la amsterdamaj SAT-anoj kaj membroj de la nederlandlingva LEA kaj je la simpatiantoj de nia afero.

Krom tio la prezoj en la lastaj jaroj iĝis timige altaj. Ni devis kutimiĝi al la fakto, ke tio, kio antaŭmilite estis pagebla per centoj da guldenoj, nun kostas milojn.

Konsiderante je la fino de marto la nombro da aliĝintoj, ni opiniis, ke ni facile venkos la gastigadan problemon, sed kiam post marto tiu nombro subite kaj salte kreskis, la problemo akutiĝis. Tamen ni ne perdis la kuraĝon. Malfacilaĵoj ekzistas por esti venkataj. Ĉu ni ne arde deziris reciproki la koran gastamecon, kiun niaj danaj gekamaradoj montris al ni pasintjare?

Helpe ne forestis. De la Nederlanda Asocio de Sindikatoj (N.V.V.), de la Unueca Sindikataro (E.V.C.) kaj de kelkaj sekcioj de nederlanda L.E.A. ni ricevis subvencion.

La estraro de nia kongresurbo Amsterdam subvenciis nian kongreson per 500 guldenoj kaj disponigis al ni 300 litojn en la urba junulargastejo. Granda ĉi urba entrepreno disponigis al ni prunte matracojn kaj litkovrilojn por 100 personoj, por disprunti al niaj anoj, kiuj volonte gastigis kongresanojn, sed ne aŭ ne plu disponas pri litaĵoj. El diversaj lokoj ĉirkaŭ Amsterdam niaj membroj proponis gastigon. Starante antaŭ tiuj malfacilaĵoj, kiuj pligrandiĝis dum la senĉesa kresko de la nombro da aliĝintoj, ni plurfoje spertis la favoran influon de nia honorkomitato: malfermiĝis al ni pordoj, kiuj alie restus al ni fermitaj.

Al ĉiuj niaj membroj, al ĉiuj niaj simpatiantoj, kiuj iel helpis la Organizan Komitaton en ĉi tiuj malfacilaĵoj, mi esprimas nian koran dankon. Ili grave kontribuis al la sukceso de nia kongressemajno.

Sed ni nun forgesu niajn penadon kaj zorgojn — vi pri via vojaĝo, ni pri la organizado — por transdoni nin al la kongreso mem, ĉi tiu imitinda ekzemplo inter la nuntempe grandnombraj internaciaj kongresoj multlingvaj.

Ni, laboristaj esperantistoj, havas la devon klopodi varbi la laboristan movadon por nia afero. Ankoraŭ regas la plej strangaj opinioj pri la parola kaj skriba uzebleco de Esperanto, pri ĝiaj esprimovo kaj literaturo. Tial ni invitis al niaj kunsidoj gvidantojn de sindikatoj kaj junularorganizoj, jurnalistojn kaj parlamentanojn kaj aliajn, kiuj havas informan aŭ gvidan poston en la laborista movado kaj okupi-

ĝas sur internacia tereno. Per propraj okuloj kaj oreloj ili konvinkiĝu pri la uzebleco de Esperanto por internaciaj kongresoj kaj... pri la netolerableco de la antikva metodo de kongresado, eĉ se tiu metodo portas modernan veston.

Ĉi tiun simplan propagadon vi ne subtaksu: malgrandaj kaŭzoj, grandaj efikoj. Lanti iam skribis: „Esperanto estas per si mem tute ne grava. Sed ni supozu, ke jam antaŭ 40 jaroj ĉiuj gvidantoj de laboristaj partioj, ĉiuj internaciistoj kaj pacistoj lernus, propagandus kaj praktikadus tiun racie artefaritan lingvon. Tiaokaze, ĉu oni prave povus aserti, ke la historia procezo irus la saman vojon?"

Gekamaradoj, unu praktika ekzemplo efikas pli multe ol cent propagandaj paroladoj. Sperte ni scias, ke tion, kion ni ne sukcesis atingi per teoriaj diskutoj, ni atingis per praktika ekzemplo. K-doĵ Nathans, Ponstein kaj Thijssen, internacie konataj laboristaj gvidintoj, komence nur favoraj al nia afero, konvertiĝis tutanime, kiam ili ĉeestis unu el niaj kongresoj.

Al ĉi tiu propagando vi ĉiuj povas senpene kontribui, ĉeestante ĉiujn niajn laborkunsidojn, por ke niaj invititoj ĉiufoje trovu la salonon plene okupita.

Cetere kiel ano vi ja havas tiun devon. Kvankam la Organiza Komitato projektis diversajn ekskursojn, kvankam granda urbo kia Amsterdam prezentas multajn allogaĵojn, vi tamen ne venis al la kongreso nur por plezuri. Antaŭ ĉio vi venis por la kon-

greso, en kiu ni pritraktos la laboron de nia organizo kiu meritas vian plenan atenton kaj interesigon.

„Antaŭe la aferoj, poste la knabino!“ Vi do vizitu ĉiun kunsidon, tiel subtenante la bonan famon pri serioza laboro, kiu karakterizas la SAT-kongresojn. Poste vi havos sufiĉe da okazo distri vin!

Kaj pri la diskutoj — ĉu ankoraŭ necesas diri ion?

Ni apartenas al unika organizo, kiu fondiĝis sur bazo sensacieca kaj nepartipolitika. Tiu bazo postulas unu-loke toleremon, ne la toleremon, kiu ĉefe konsistas el indiferenteco, sed tian toleremon, kiu plene agnoskas la rajton de la kontraŭulo havi alian opinion ol ni, kaj kiu ne altrudas opinion propran, nek konsideras ĝin la unusola vero. Laŭ instruoj de Lanti ni iaforte kuraĝu dubi pri iam akceptitaj tezoj, kaj ne hezitu iaforte herezi pri ŝatata teorio. Tio estas ebla nur, se ni estas sinceraj al ni mem kaj klopodas objekte rigardi la aferojn. Tia teniĝo evitos la dogmiĝon de niaj ideoj.

Sur la kampo de la demagogio nia asocio ne aktivus. Ĝia tereno estas la senpasia rezonado kaj diskutado, la solaj indaj rimedoj por persvadi kontraŭulon. Se tiaj rezonadoj kaj diskutadoj pro dogmece kaj fanatikeco ne plu estus eblaj, nia organizo estus perdinta sian ekzistrajton. Mi do esprimas la deziron, ke la preparoladoj okazu objekte kaj kamaradece, por ke ni poste povu rememori agrablan kaj fruktedonan kongreson!

## Zamenhofstratoj

Legante en nia Kongreslibro pri la decido de la urba estraro de Amsterdam nomi okaze de nia Kongreso iun straton laŭ d-ro Zamenhof, vi certe demandis al vi „Kie jam troviĝas stratoj nomitaj laŭ niaj Majstro kaj nia lingvo?“ Jen la respondo:

Zamenhof- kaj Esperanto-stratoj, -placoj kaj -monumentoj troviĝas ĝis nun en jenaj landoj kaj lokoj:

AŬSTRIO: Vieno.

BRAZILO: Aracaju, Realengo, Rio de Janeiro.

ĈEĤOSLOVAKIO: Drahoŭice, Bor, Bratislava, Nové Zámky, Olomouc, Hradec Kralové.

DANZIG.

FRANCIO: Amiens, Boulogne sur Mer, Cannes, Clamart Issy les Moul, Malakoff, Montebeliard, Mullhouse, St. Raphaël, Sotteville l.R., Viroflay.

GERMANIO: Bad Neuenahr, Dresden, Düsseldorf, München, Oelsnitz, Rüsselsheim bei Frankfurt.

HISPANIO: Valencia, Castellon de la Plana, Matadespera, Santander.

HUNGARIO: Nyregyhaza, Pécs, Erd, Budapest.

ITALIO: Milano.

KATALUNIO: Barcelona, Cassà de la Selva, Sabadell, San Feliu de G., Terrassa, Vendrell, Vich, Vinaroç.

LATVIO: Libavo.

LITOVIO: Kovno.

NEDERLANDO: Arnhem, Bergen op Zoom, Texel, Rotterdam, Arnhem.

PALESTINO: Tel-Aviv.

POLIO: Bjalistok, Brzeziny, Krakov, Lodz, Sródborów, Varsovio, Bjalistok, Gdansk, (Danzig), Jelenia Gora, Krakov, Lodz, Srodoborów, Varsovio, Wielun, Zamose.

RUMANIO: Oradea.

SOVETIO: Barnaul, Vitebsk, Tiflis.

La listo — kiu verŝajne ne estas komplete — estas kompilita laŭ la Enciklopedio de Esperanto kaj aliaj fontoj. La lokoj, kies nomoj estas kursive presitaj, ricevis Zamenhof- aŭ Esperanto-straton post la lasta milito aŭ renovigis la malnovan, kiu pro militaj kaŭzoj malaperis.

Hodiaŭ je la 14.00a ankaŭ Amsterdam akiros sian Zamenhofstraton!

# K-do Bannier

kiu dîmanĉtagmeze transprenis la prezidantan martelon de k-do Faulhaber, salutis la kongreson nome de la plenumkomitato per ĉi suba parolado:

Ĉe miaj proksimuloj, ĉe miaj malnovaj konatuloj mi ĝuas la reputacion de homo ne tre sentimental. Eble ilia diagnozo estas ĝenerale ĝusta, sed ĝi estas erara almenaŭ en unu okazo. Ĉiufoje kiam mi ekstaras antaŭ SAT-ana publiko mi baraktas kontraŭ eksterordinara emocio, kiu rabas al mi parton el miaj pensrimedoj.

Tiu animstato facile klariĝas! Ja, aperi subite antaŭ elito da pli ol 1000 personoj, antaŭ familio al kies kreado kaj edukado oni kontribuis, tio ne estas ĉiutagaĵo. Pasis jam 29 jaroj de kiam k-do Lanti, Glodo, Piron kaj mi mem fondis la bazon de SAT! El tiu kvaroj mankas nun k-do Lanti. Krome vivas ankoraŭ kelkaj el la unua cento de SAT-anoj; ekz. mi vidas inter vi k-don Kaŝon. Inter la veteranoj, kiuj pro la cirkonstancoj ne povis veni al Amsterdam, kaj kiuj malgraŭ ĉio restis daŭre fidelaj al ni, mi citu: k-dojn Deubler, Munĥeno; v. d. Heid, Bielefeld; Wagner, Stutgard; Kocheritz, Dresden; Lercheur, Leipzig kaj fine nian ĝismodelan SAT-anon, k-don Bartelmes kaj aliajn, kies nomojn mi momente forgesis.

Kiom da aventuroj ni travivis... Kiel ni penadis... dum tiuj 29 jaroj... Kiom da rifoj ni devis preterumi... Kiom da kaptuloj ni evitis... Kiom da krizoj ni solvis... Kaj tamen malgraŭ la atakoj, malgraŭ la milito, malgraŭ ĉio kontraŭa, nia asocio plue vivas, eĉ pli; ĝi havas antaŭ si pli kaj pli belajn perspektivojn. Niaj ideoj, konsiderataj utopiaj ĉirkaŭ la jaro 1920, nun komencas disvolviĝi; niaj semoj ĝermis kaj kreskis. La fakto, ke SAT transvivis la militon kaj reaktivis sur la bazo de la origina statuto kaj programo, tio pravas la pravecon de ĝia principaro. Ni sekvas la ĝustan vojon, kiu kondukos al la fina sukceso, nome: atingi ke esperanto estu aplikata grandskale, socie, socialisme kiel unuaranga instrumento de kulturo sennacieca, kiu anstataŭos la antagonistajn kulturojn naciecajn. Ni, SAT-anoj, estas la plej konsekvencaj ne nur el la esperantistoj, sed el la tiel nomataj progresemaj homoj. Ni persistu!

## Sciindajoj

Prezidas nian kongreson la k-doj Louis, Francio; Jacobsen, Danio; Rosenbloom, Anglio; Faulhaber kaj Wels, Nederlando. Protokolantoj estas la k-doj Cachon, Brugman kaj Nora Walton. La proponkomitato konsistas el la k-doj Van Rijn, Mäs kaj Colo. La anoj de la voĉdonkomitato estas: Malton kaj Welman. La financojn kontrolas la k-doj Bannier, Minke, Alberts kaj Henstra.

# La unua tramveturilo...

La vekhorloĝo alarmas. Estas dekono post la kvina. Mi plene vekigis kaj saltis el la lito. „Ĉu jam nun vi devas iri al la kongresejo?“ demandas mia edzino.

„Mi iros al la tramremizo por kontroli, ĉu...“  
„Sed baldaŭ revenu; vi ja ankoraŭ ne manĝis.“  
„Jes, kompreneble.“

La lastajn monatojn OKK kun siaj helpantoj febre laboris, por ke ĉiuj aranĝoj estu ĝustatempe pretaj. Ju pli la kongreso proksimiĝis, des pli amasiĝis la laboro. La nombro da aliĝintoj senĉese kreskis. Ĉu ĉiuj venos? Ĉu niaj aranĝoj sulĉos aŭ ĉu ili evidentiĝos tro ampleksaj? En la lastaj tagoj ni ne sciis, ĉu ni ĝoju aŭ timu pri ĉiu nova aliĝo. Centoj da detaloj postulis nian atenton. Nenion ni volis riski, nenion ni volis lasi al la hazardo. Sur la aliĝiloj multaj anoj forgesis respondi pri nukleoj, kio postulis korespondadon; aliaj skribis sur ĝi tulan romanon, pri kiu ni ne interesiĝis, kaj ambaŭ kaŭzis perdon de tempo. Pluraj havis privatajn dezirojn, kiujn ni, se eble, plenumis; kelkaj tiom malmulte informis nin, ke ni eĉ devis peti pri... la aliĝilo! Zorgoj pri vizitoj, „mon-ologio“, gastigado kaj presajtoj grizigis niajn harojn. Kongresdiablotoj plurfoje malordigis projektitajn planojn kaj devigis nin fari novajn.

Sed ni ne perdis la kuraĝon. Ĉe la fino de niaj preparoj ja atendos nia 21a! Kaj amuzate ni legis kelkajn leterojn, kies skribintoj, tute ne informiĝinte pri la kialoj kaj la kialoj de certaj aranĝoj, forte riproĉas nin... Ni ridetis. En la lastaj tagoj ni fariĝis pardonemaj. Nia konscienco estas pura. Neniu kaj nenio sukcesos ĝeni nian bonan humoron, kiun ni volas konservi sennuba — por la kongreso. Hieraŭ vespere ni kontrolis ĉiujn aranĝojn. Ŝajnis al ni, ke ni estas tute pretaj por akcepti niajn gastojn kaj sekve povas senzorge enlitiĝi. Ĉu efektive senzorge? Mi estas certa, ke antaŭ ol ekdormi, ĉiu el ni ankoraŭ momenton estis turmentata de la penso: Ĉu ni vere nenion forgesis, nenion malatentis?

Kaj nun mi staras antaŭ la tramremizo Havenstraat, atendente. Jen aperas la unua tramveturilo. Ĝi apartenas al linio 1a. Ĝin sekvas alia, apartenanta al linio 2a. Mi atentigas. Jes, en ordo!

Unu post alia la veturiloj forlasas la remizon, kaj tiuj, kiuj preterpasadas la kongresejon portas super la kapo de la direktistilo la surskribon:

Esperanto-Kongreso Bellevue kun verda stelo.  
Trankviliĝinte, mi iras hejmen.  
Turhorloĝo batas la sesan horon.  
La kongres-semajno komenciĝis... F.

## Ekskursoj

je jaŭdo kaj vendredo

**EKSKURSO A: AL AALSMEER KAJ SCHIPHOL** (jaŭdon 5-8-1948) forveturo 7.45 Schinkelke (tramo no. 1) per boato al Aalsmeer; alveno proks. je la 9a. La partoprenantoj de la plej granda boato (entute 400) antaŭe vizitos la aŭkcion, la aliaj ĝekamaradoj vizitos la kulturejojn. Proks. je la 11a la grupoj interŝanĝos. Je la 12.30 ni komune lunkos. La partoprenantoj devas mem kunporti panon; trinkajcaj oni ricevos per kupono „A“ de via kongreskarto. Post la manĝado ni ensipiĝos kaj ŝipveturos unu horon sur la belegaj lagoj. Je la 3a ni alvenos al Schiphol. La partoprenantoj de la plej granda ŝipo antaŭe vizitos la ilughavenon; la aliaj ĝekamaradoj intertempe trinkos teon sur la teraso (la teon oni akiras per kupono „B“ de la kongreskarto). Poste la grupoj interŝanĝos. Proks. je la 5a ni forlasos Schiphol kaj revenos en Amsterdam proks. je la 6a.

**EKSKURSO B: AL LA ALTFORNOJ IJMUIDEN** (jaŭdon 5-8-1948) (atentu bone, ke nur viroj rajtas viziti la altfornojn). La partoprenantoj kolektiĝu je 9.30 matene antaŭ la kongresejo „Bellevue“. La vagonaro forveturos 10.43. Sekcio Beverwijk aranĝos agrablan ekskurson en la ĉirkauaĵoj de Beverwijk. Vespere ĉi vizitos la altfornojn. Reveno en Amsterdam proks. je 9.30.

**EKSKURSO C: AL MARKEN KAJ VOLLENDAM** (Vendredon 6-8-1948) la partoprenantoj kolektiĝu antaŭ la stacidomo je 8.45 matene (atentu la Esperanto-flagon ĉe la stacidomo de Noord-Zuid-Hollandsche Vervoer Mij.) Se multaj ĝekamaradoj partoprenos, ni dividos la kombon en du partojn. Sciĝoj pri tio sur la tabulo en la akceptejo. Ni antaŭe iros al Monnikendam, malgranda antikva urbeto, poste per boato al Marken, kie ni promenos duonan horon por vidi la dometojn ktp. Per ŝipo de Marken al Vo-

lendam, kie ni komune lunkos (la panon ĉi mem devos kunporti, sed trinkajcaj oni ricevos per kupono „C“). Tie la gvidanto de la ekskurso, k-do Naerebout, rakontos pri historio de la urbeto kaj enloĝantoj. Duonan horon la ĝekamaradoj povos promeni en la urbeto, post tio ni daŭriĝos la ekskurson per promenado laŭ la mardigo al Edam, kie la tramo atendos nin por konduki nin al Amsterdam; alveno proks. je la 6a horo.

## Nia interfratiĝvespero

Estas vere, ke nederlandanoj kutimas veni dekkvin minutojn pli malfrue ol en la horo fiksita. Sed post la spertoj en nia interfratiĝvespero ni ekkredas, ke tiu malbona kutimo ekzistas ankaŭ en aliaj landoj. Certaj pri tio ni tamen ne estas, ĉar dum nia interfratiĝvespero ni ne povis distingi nederlandanojn de alilandanoj. Ĉiuj ja parolis nur unu saman lingvon: Esperanto. Kaj tio almenaŭ estas bona kutimo!

La gvidanto de la vespero estis k-do G. Oosterbaan, kiu kune kun siaj helpantoj havigis al ni kelkajn agrablajn horojn. Kompreneble estis niaj propraj kamaradoj, kiuj prizorgis la programon: La Verda Kabaredo, La Verdaj Steloj kaj JuKo. Atentu, la sinsekvo de tiuj ĉi nomoj estas tute hazarda. Ĉiuj sukcesis bonege amuzi la ĉeestantojn: La Verda Kabaredo kun siaj teatraĵoj, La Verdaj Steloj kun siaj muziko kaj kantoj, JuKo kun siaj dancoj en naciaj vestoj.

La kantoj de k-do Barbiers jam fariĝas konataj en Esperantio. Kiu ne plezure aŭskultis: „Mi deziras edzon. Kian edzon, karulin? Ĉu Esperantisto? Kompreneble jes! Ĉar per la Esperanto rond' mi iras tra la tuta mond' Grandega la plezur' kun sennaciulo nuri!“

Deklamis por ni k-dino Lien Nipperus, kiu bonege faris tion. Estis la nura momento kiam ĉiuj ĉeestantoj silente aŭskultis. Dum la aliaj prezentoj oni kondukis sin iom tio brua. Tiel la vespero sendube akiris la deziritan liberan karakteron, sed ni malfaciligis la taskon de niaj aktoroj.

La kunveno malfermiĝis per komuna kantado de „La Internacio“ kaj je la fino ni kantis „Fratoj al suno“.

Dankon al ĉiuj kunlaborintoj!



# La Voĉo de la Kongreso

N-ro 3, 5a de aŭgusto 1948a

Eldono okaze de la 21a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — Amsterdam 31a de julio — 5a de aŭgusto 1948a

## SAT-movado en Germanio

Kiam SAT pasintan jaron kongresis en Aarhus niaj germanaj k-doĵ ne povis ĉeesti. Ankaŭ ĉi jare ili ne povis akiri permeson veni al Amsterdam. Se ili do ne povis aŭdigi siajn voĉojn en niaj kongresoj, ili almenaŭ havu okazon fari tion en nia gazeto. Kiel statas la laborista Esperantomovado en Germanio oni legu en ĉi tiu artikolo de k-do Konrad Deubler.

„Laboristoj en tuta mondo unuigu Vin!“ Tiu ĉi devizo ĉiujare je la unua de majo pli forte vokita tra la mondo donis al la unuaj Esperanto-pioniroj socialisme aŭ liberece pensantaj en Germanio la stimulon fondi propran Esperanto-Asociacion. Ties taskoj estu: Disvastigi Esperanton inter la laboristaro germane parolanta kaj utiligi Esperanton por ĝiaj organizoj socialisme aŭ liberece tendencaj. Tial, ke tiam en la tuta germana laborista movado regis klaraj pensoj pri la nepra neceso de kunlaboro internacia, la ideo pri neŭtrala lingvo internacia povis ekflamiĝi la korojn de ĝiaj anoj, kiam ilin trafis la sciigo pri la solvo de ĉi tiu problemo per Esperanto. La unua Laborista Esperanto Grupo fondiĝis 1909 en München. (Munĥeno, ĉefurbo de lando Bavario apartenanta al federacio de la germana regno.) Sendepende unu de la alia simile estiĝis grupoj en Leipzig, Hannover, Hamburg, Kassel, Frankfurt ktp, kiuj fondis en jaro 1911 asociacion sub la nomo „Germana Laborista Esperanto Asocio“. Gravaj decidoj estis: Eldono de monata gazeto, propraj lernolibroj, kaj propagandiloj. La gazeto celis: 1. per artikoloj germanlingvaj pri Esperanto varbi por E, speciale inter la laboristaro, 2. lingve instrui komencantojn kaj progresantojn per tekstoj taŭgaj, 3. per publikigo de adresoj ebligis la interrilatojn kun samcelanoj eksterlandaj, 4. servi kiel informilo asocia kaj raportilo pri la grupa vivo, 5. stimuli la geanojn al la legado de „Internacia Socia Revuo“ kaj de broŝuretoj librectendencaj kiel: „Al la virinoj“, „Antipatriotismo“, „La komunista manifesto“, „Por ataki kaj defendi“ ks.

Ĝis la mezo de jaro 1914 la asocio normale kreskis. Preskaŭ en ĉiuj grandaj urboj estis grupoj, en multaj aliaj lokoj izolaj membroj kiel ĝermoj de novaj grupoj. En ateroj lingvaj kaj komune propagandaj, tiuj grupoj bone kontaktis kun la neŭtralaj grupoj. La asocia estraro, la grupoj, la izolaj anoj kaj la aktivaj membroj senpere interrilatis kun samcelanoj eksterlandaj. Tiel ili preparis komune la grundon por tutmonda organizo por laboristaj Esperantistoj.

La eksplodo de la unua mondmilito haltigis tiun ĉi evoluon prosperigan. Dum la daŭro de la milito multaj grupoj devis interrompi la regulajn kunvenojn pro foresto de geanoj. En la jaro 1919 multaj grupoj reviviĝis kaj la asocio komencis ree interligi ilin. La perdo de multaj k-doĵ fervoraj kaj kapablaj estis

grave sentata. Tamen, la mondmilito tro senteble pruvis la neceson de tutmonda solidaro de la laboristaro, se mizero kaj timo ne dumvive akompanu ĝin. „Nur per komuna lingvo Internacio la laboristaro fariĝas vere viva kaj agadkapabla“, diris niaj entuziasmuloj, kaj daŭrigis siajn laborojn. En la urbo Leipzig fortiĝis la grupo tiel, ke ĝi povis esti la centro de la asocio.

Per la fondiĝo (en fakkunsido dum la 13a Universala Esperanto Kongreso en Praha 1921) de la tutmonda organizo SAT, kiu transprenis la per-Esperanto-taskojn kaj modele plenumis ilin, LEA por la germanlingvaj regionoj povis kolekti ĉiujn siajn fortojn por la du solaj taskoj: Propagandi kaj instruadi Esperanton. La movado refortiĝis kaj kreskis. En la jaro 1931 la eldonkvanto de „Arbeiter Esperantist“ atingis monate 10 mil da ekzempleroj; la asocio disponis pri du diversmetodaj lernolibroj; miloj da varbafiŝoj kaj centmiloj da flugfolioj estis disdonataj; en multaj tagaj kaj periodaj gazetoj de la diversaj laboristaj organizoj kaj sindikatoj aperis artikoloj kaj eĉ E-kursoj. En pli ol 600 lokoj la asocio havis siajn gembrojn. Granda parto de ili, la lingvospertaj, estis ankaŭ membroj de SAT kaj legis Sennaciulon.

Sed la skismo, kiu trairis la tutan germanan laboristan movadon kaj pri kiu neniu el niaj gembroj kulpis, fine ne haltis antaŭ nia LEA. Mi havis kaj havas la konvinkon, ke la gek-doĵ aktive partoprenantaj la tiaman tem-

pon agis en bona intenco. Ilin gvidis la volo daŭrigi laŭeble plej efike la por E laborojn en la de ili influablaj rondoĵ. Laŭ la raportoj ricevitaĵ pri la nombro de la gekursanoj por la vintrokursoj 1932/33 ĝi multe superis tiun de la antaŭaj jaroj. Tial eĉ tiu ĉi disigo de la asocio, k'u komence iom lamigis la flugilojn de multaj entuziasmuloj, kiuj revis pri unueca movado, ne estus povinta haltigi la eblecon disvastigi E en la diverstendencajn laboristajn movadojn. Sed la ekzisto de la du politikaj organizoj diverstendencaj laŭ la metodoj de ili varbataj kaj praktikataj por atingi la ankoraŭ ĉiam propagandatan saman celon de kreo je sociordo socialisma sen ekspluado kaj sen subpremo, rezultis la rapidan venkon de la „naci“ (Hitleraj) movado, kiu estis protektata de la reaktularo germana kaj eble ankaŭ ekstergermana.

Dum la unuaj monatoj de la 1933 la iam plej forta kaj fiera germana laborista movado disfalis. Ĝiaj gvidantoj kaj multaj funkciuloj suferis en malliberejoj aŭ estis mortigitaj. Ankaŭ nia LEA estis likvidita perforte. Multaj grupoj provis memstare per iaj maskoj kunligi la geanojn kaj iel resti en kontakto kun la aliaj grupoj. Neniu pensis pri multjara daŭro de Hitlera regado, sed esperis pri helpo de eksterlando. Sed eksterlando restis pasiva. Enlande la reto de la politika polico pli densiĝis. Traserĉoj de loĝejoj, konfiskoĵ de E libroj, policaĵ esplordemandadoj, arestoj kaj similaj perfortaj agoj plimultiĝis eĉ funkciuloj kaj geanoj. La kontakto fariĝis eĉ pli kaj pli malofta. Poŝta interigo inter la iamaj funkciuloj apenaŭ estis ebla. Sennaciulo fariĝis rarajo. La eksplodo de la 2a mondmilito ŝajne detruis ankoraŭ la reston de la interrilatoj. Tamen ebligis kelkfoje eĉ interrilati diversmaniere kun eksterlandaj samideanoj. La sciigo, ke niaj eksterlandaj SAT k-doĵ fidele kaj senlace laboradas, donis al ni novan esperon kaj energion. Tutkoran dankon al ili.

La fino de la 2a mondmilito vekis eĉ multaj gek-doĵ la malnovan laboremon al nia mova-

*La OKK de nia 21a, de maldekstre dekstren: k-do B. Bultemeijer, k-dino H. Oudenhooven—Bishoff, k-do F. Faulhaber kaj k-do H. ten Hagen. Komprenoble ili povis fari la laboron ne solaj. Dekoj da aliaj sindonaj k-doĵ helpis ilin. Komuna laboro kondukis al granda sukceso de nia 21a.*



# Nia vizito al Aalsmeer

do. La divido de Germanio en kvar Zonoj estrataj de militistaj registaroj de diversaj statoj komence preskaŭ tute baris la interrilatojn ne nur personajn sed ankaŭ la poŝtajn. La malpermeso de grupa kunveno sen posedo de Licenzo (speciala permesilo) prokrastis pli fortan kontakton de gek-doj eĉ en sama loko. Ĉiuj aliaj baroj kaj malhelpoj kiel ekzemple la malbona nutraĵa situacio, manko de hejtajo, la malabundo de trafikoj, de lumo kaj ejoj, kaj la malfacila dumnokta influo malfavore al la efektiviĝo de nia ideo: Tre baldaŭ starigi grandbazan kaj bone fundamentitan movadon.

Sed kiel bona semo transvivis multajn jarojn, tiel niaj gek-doj transvivintaj la Hitler-regnon, kiun ili neniam kaj neniel aprobis, restis fidelaj al nia ideo. Kiam nun ilin trafis la unuaj sunradioj de libereco ili komencis kolekti kaj labori.

La E movado en nuna Germanio ne jam tute libere povis disvolviĝi. Germana Esperanto Aocio ĝis nun estas la sole permesata organizo. La iamaj membroj de LEA laboras tre fervore en ĝia kadro. Krom tio ili ĝojegis kaj eĉ fieris, kiam ili ricevis la unuajn numerojn de „SAT Amikaro“ kaj „Sennaciulo“. Ilia per-Esperanto organizo estas SAT, al kiu ĝis nun anoncis sin ree pli ol mil gekamaradoj en ĉirkaŭ 150 lokoj. Bedaŭrinde la nuna stato politika kaj ekonomia tute ne eblas, ke ni SAT anoj loĝantaj en Germanio povas pagi per internacie valora mono nian kotizon kaj gazetojn, jarlibron kaj aliajn SAT eldonaĵojn. Vi, ekstergermaniaj SAT-anoj malavare helpas al ni ĝis nun, liverante ĉion sen rekompenco nia. Ni nur povos kaj volas danki al vi per pli entuziasma agado por nia komuna ideo.

Dum Pentekosto 1948 okazis en München la unua postmilita Germana Esperanto Kongreso. Dank' al la ĉeesto de multaj eksterlandaj gek-doj tiu ĉi kongreso fariĝis impona demonstracio por Esperanto. En speciala kunveno, al kiu ĉeestis 200 SAT gek-doj, ili priparolis la nunajn propagandajn problemojn kaj situacion de SAT en Germanio. K-do Bannier, Parizo, nomis nin, malfermante sian paroladon, „Fratoj kaj fratinoj! Salutojn k-decajn de ni, kiuj estas ankoraŭ disigitaj per landlimoj!“ Ni sentis lian manpremon sinceran. Niaj koroj tremis pro emocio aŭskultante lin. Ni sentis: Ni germanaj gek-doj ne estas kaj ne restos solaj sed apartenas samrajte al la batalantaro por nova mondomo. Vivu SAT. Konrad Deubler.

## Kultura vespero

Feliĉe nia kongreso konsistas ne nur el laborkunsidoj. Tio fariĝis tio laciĝa, tiel por la parolantoj kiel por la aŭskultantoj. La OKK do zorgis ankaŭ por nia distro kaj ĝi i.a. havigis al ni bonegan kulturalan vesperon. La gvidanto de la vespero estis k-do Van Haren, kiu per sia klara voĉo kreis ordon kiam tio necesis. Kaj jen kaj jen li devis agi, ĉar ankaŭ en SAT-io ni havas, kelkajn strangajn homojn, homojn, kiuj preferas resti starantaj en momentoj kiam ili devas sidi kaj kiuj ne deziras leviĝi de siaj seĝoj kiam ili devas stari...

Sed ni parolu pri la programo de nia kultura vespero. Ne mankis bonaj kunlaborantoj. La muziksocieto „Forzando“, la baledgrupo de junaj knabinoj, la muzikgrupo kaj Riek Hippe-Tendeloo, nia kantistino, ĉiuj faris sian plej bonan kaj ĉiuj ricevis la meritajn aplaŭdojn. Kial ni, Esperantistoj, tiom ŝatis ĉi tiun programon? Unualoke pro la bela prezentado de la tuto, sed dualoke pro nia subkonscia sento, ke samkiel nia lingvo ankaŭ muziko kaj baledo estas sennaciaj, ke ili estas ĝueblaj por ĉiuj ajn. Bedaŭrinde ne ĉiuj kunlaborintoj al nia kultura vespero jam scipovas nian kulturalan sennacian lingvon. Tial k-do Van Haren devis esprimi nian dankon al la artistoj nederlandlingve. Nur por la kantistino li povis fari tion en Esperanto. Bonege! La vespero finiĝis per komuna kantado kun

Vizitante Aalsmeer vi ekstere kaj interne rigardis la konstruaĵojn de la Kooperativa Asocio „Centra Aalsmeera Aŭkcio“, impresiĝis pro la belega floraro kaj vidis, ĝis kia grado disvolviĝis ĉi tiu entrepreno fondita en 1912.

Ĉi tiu transvido celas doni al vi memoraĵon pri via vizito. Ĝi do ne estas plena priskribo kun longa serio da detaloj, sed konciza resumo, laŭ kiu vi povos enpense ripeti vian promenon kaj kiu revokos en vian spiriton krom la plej gravajn momentojn el tiu ĉi entreprena agado ankaŭ la arĥitekturan belecon de la konstruaĵoj projektitaj de la intertempe mortinta konstruisto J. F. Staal.

Ni venis do tra la ĉefenirejo en Ejon I, kien matene la ĵus tranĉitaj dianoj, rozoj aŭ seringoj estis alportataj kaj sur la florveturilojn ordigataj. Sur tiuj veturiloj oni transportas la florojn antaŭ tribunon I, kie okazas la vendado. La samo okazas pri la diversaj aliaj floroj, kiujn ni admiris en Ejo II kaj kiuj trovas sian vojon al la aĉetantoj sur tribunon II.

Inter la aĉetantoj troviĝas komercistoj pogranda kaj pomalgranda.

Diversaj komercistoj havas proprajn enpakejojn, kiujn ili luas de la kooperativo kaj kie ili havas okazon rapide prepari la florojn por forsendado. Ĉi tiuj ejoj estas ekipitaj per tabloj por la enpakado, stablo por kestoj, telefono ktp.

En la ejoj, kie okazas la vendado oni trovas kontraŭ la tribunon la elektran aŭkcian aparaton, kiu aŭtomate plenumas la laboron de la aŭkciisto. Krome troviĝas tie balkono, kie dum la aŭkciado sidas la aŭkciisto kaj la skribistoj.

Ĉiuj lokoj de la aĉetantoj sur la tribunon estas numeritaj; ĉe ĉiu loko troviĝas butono, per kiu la aĉetanto kontaktas kun la aŭkcia aparato.

Kiam la veturilo kun la floroj estas veturigata antaŭ la tribunon, la aŭkciisto laŭte anoncas la specon kaj la konsiston de la aŭkciota kvanto, dum

la t.n. „levisto“ levigas la florojn por pli klare montri ilin al la aĉetantoj, menciante eventualajn mankojn. Jen, la montrilo de la aŭkcia aparato estas movata kaj pasas la nombrojn 100—1, starantajn ĉirkaŭ la ciferplato. Tuj kiam ĝi atingis nombron indikantan la prezon, kiun iu aĉetanto volas pagi por la koncerna kvanto, li premas la butonon ĉe sia sidloko, sekve de kio la montrilo haltas kaj li fariĝas la posedanto. La aĉetanto tuj koniĝas, ĉar malantaŭ lia numero sur la aparato eklumas lampeto. La skribisto notas la diversajn aferojn sur slipoj, kiuj kune kun la aŭkciejaj libroj aŭtomate estas sendataj al la oficejo, kie la floroj post fino de la aŭkciado devas esti pagataj.

La aŭkciado de pot-kreskaj okazas preskaŭ same kiel tiu de la detranĉitaj floroj. Diference de la lastnoma, kiu okazas ĉiutage, la aŭkciado de pot-kreskaj okazas trifoje semajne, nome marde, jaŭde kaj sabate. La ceteraj tagoj estas destinitaj por la alportado de aŭkciotaj pot-kreskaj. Ĉi tiu alportado okazas grandparte pere de la karakterizaj aalsmeer'aj boatoj, kiuj preskaŭ ĉiuj estas ekipitaj per eksterboata motoro.

La boataj estas malsarĝataj en tegmentita haveno. Precipe vintre estas grava avantaĝo, ke floroj kaj aliaj kreskaj povas esti elŝipigataj en la varmigita konstruaĵo kaj do ne spertas malutilon pro malfavora vetero.

Ni volus daŭrigi, rakontante pri la oportuna kaj celtrafa aranĝo de la oficejoj kaj iliaj komunikiloj, sed la malgranda spaco en nia kongres-organon malpermesas tion. Ni kontentiĝas, se vi, legante ĉi tiun resumon, revidas en via spirito la Centran Aalsmeer'an Aŭkciojn kaj ree admiras la entreprenemon, kuraĝon kaj organizan talenton de la aalsmeer'aj kulturistoj, pro kiuj iliaj produktoj trovas pere de la aŭkcio merkaton ne nur en Nederlando, sed ankaŭ en ĉiuj landoj de Eŭropo kaj eĉ malproksime ekster ĉi tiu mondparto.

muziko de „Forsando“ de „La Internacio“. Entuziasme ni kantis. Por finlukto socia ni grupiĝu en rond', kaj la Internacio triumfu en tutmond'!

Nia kulturo vespero de dimanĉo la 1an de aŭgusto pasis. Ĝi estis sukcesego!

## Nia popoluniversitato

„Ni fakte bedaŭras, ke okazis ne pli da tiaj kunvenoj dum nia kongreso“ diris Bas Wels post la lekcion de k-do v. d. Starre pri „Bellamy-ekonomio“ kaj k-do Waringhien pri „La Idisma krizo kaj ĝiaj instruoj“ kaj ĉiuj, kiuj aŭskultis ambaŭ lekcionojn konsentis pri tiuj vortoj de Bas Wels.

K-do v. d. Starre klarigis por ni la ekonomian sistemon proponitan de Bellamy, kiun oni ofte konsideras iu fantazio, sed kiu

estas realigebla se la homaro nur pretus labori por tio. Kiam oni ĝenerale akceptos la ideojn de Bellamy malfermiĝos por la homaro pli feliĉa kaj bonstata mondo.

K-do Waringhien malkovris por ni kelkajn ĝis nun nekonatajn aferojn el la historio de Esperanto. Li skizis por ni la estiĝon de la reformprojektoj kaj li argumentis kial tiuj projektoj malsukcesis kaj kial ni devas gardi Esperanton kontraŭ estantaj kaj estontaj reformemuloj. Aktuala temo! Ankaŭ nun nia lingvo estas minacata de kelkaj eble bonintencaj sed tamen dangeaj reformemuloj. Ni esperas, ke la prelego de k-do Waringhien povos esti publikigita en „Sennaciulo“. Ĝi meritas la plenan atenton de ĉiu honesta Esperantisto.

La vizitado al ĉi tiu nia popoluniversitato estis mirige granda.

# Laborkunsidoj

Ni absolute ne rajtas plendi pri la nombro da vizitantoj al niaj laborkunsidoj. Amsterdam ja estas tre societa urbo kaj komence ni do iom timis, ke multaj kongresanoj preferus amuziĝon super serioza laboro. Tio tamen montriĝis timo superflua, ĉar dum ĉiuj niaj laborkunsidoj nia kongressalono estis plenplena. Kaj kiel atente la kongresanoj aŭskultis ĉiujn paroladojn!

Jen kaj jen la diskutoj estis iom akraj. Sed feliĉe ĉi tio okazis nur malofte kaj ĝenerale regis la bona kamara-deca sfero, kiun SAT tiom ege bezonas por prosperi.

La jarraporto de la plenumkomitato estis unuanime akceptita, samkiel la financa raporto kaj la raporto de la konfliktkomisiono.

Post pridiskuto ankaŭ la raporto de la redaktoroj de „Sennaciulo” estis unuanime akceptita. Montriĝas neeble ĉiam kontentigi ĉiujn legantojn. La redaktoroj klopodas kontentigi almenaŭ kiom plej multe da niaj SAT-anoj!

La deziro de kelkaj k-doĵ, ke SAT verkigu kaj eldonu sian historion estis pridiskutita. Deziro bona, sed ĉu ankaŭ jam baldaŭ efektivebla? Principe la kongreso akceptis la proponon.

Alia propono estis pri la kongreskotizo. K-do Sulsky ja proponis, ke ĝi estu ne pli alta ol la jarkotizo de aktiva membro al SAT. Ĉi tiu propono estis malakceptita. Kiu ankoraŭ estas ne konvinkita pri la neceso de malakcepto de ĉi tiu propono parolu foje kun k-do Bultemeijer, la kasisto de nia OKK. Tamen dekkvar tagojn post la kongreso, ĉar li minimume bezonas tiom da tempo por iom ripozi.

La plej grava propono en nia 21a temis pri la Goteborga Konvencio. Nia Plenumkomitato kaj nia LEA-komitato komune serĉis solvon por la malagrablajoj pro forlaso de aŭ malobeo al tiu fama konvencio. Ili kunmetis aldonon al la 3a paragrafo de la konvencio, kiun aldonon la kongreso aprobis. Ĝia teksto sekvas ĉi sube:

„Sur la bazo de tiu paragrafo povos aperi tri specoj de eldonoj, nome

1. Esperanto-eldonoj sub la ŝildo de SAT, eldonitaj de SAT mem.
2. Esperanto-eldonoj sub la ŝildo de SAT, elektitaj kaj eldonitaj de LEA-oj post interkonsento kun SAT.
3. Esperanto-eldonoj elektitaj kaj eldonitaj de LEA-oj mem, post interkonsento kun SAT.

La LEA-oj havas konsilan voĉon kon-

cerne la eldonojn de SAT mem, rilate la enhavon kaj teĥnikan aranĝon. La eldonoj aperos sub kontrolo de Literatura Komitato de SAT, la membroj de tiu ĉi komitato estas elektitaj post konsento de la Plenumkomitato. La LEA-oj ricevas monopolon por la vendado de SAT-eldonoj kaj por la eldonoj de la 3a speco en sia lingva teritorio. Sistema propagando pri ĉi tiuj eldonoj de la 1a kaj 2a speco estos farata en la organoj de SAT kaj de la LEA-oj.”

En ĉi tiu artikolo ni povis tuŝi nur kelkajn punktojn de nia kongrestagordo. Plene informitaj niaj kamaradoj estos per „Sennaciulo”. Ni nur ankoraŭfoje ripetu, ke niaj laborkunsidoj estis sukcesaj. Ke ili portu fruktojn por nia bela organizo!

## Amsterdam honoras d-ron Zamenhof

Komune ni faris la longan promenadon de „Bellevue”, nia kongresejo, al Plaatijzerweg, kiu estus baptita Zamenhofstrato. Tiu promonado tamen valoris niaj penoj kaj lacigo, ĉar per nia procesio ni faris bonegan propagandon por Esperanto. Ofte ni aŭdis rimarkojn de la publiko kiel: „Kiom multe da Esperantistoj” ktp. Kaj efektive: ni havis belan grandan procesion, al kiu pli ol 500 gekamaradoj partoprenis.

La socialista skabeno J. J. v. d. Velde inaŭguris la straton per parolado en Esperanto. I.a. li diris:

„Ricevinte la peton por nomi straton en nia urbo honore al doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la urbestro tre volonte progresiĝis, ke ĉi tiu peto estu plenumata. Laŭ propono de la urbestro la komunuma konsilantaro de Amsterdam unuanime decidis doni al la strato, en kiu ni nun staras, la nomon de Zamenhof.

Estas la celo de nia komunumestraro honori la homon, kiu kreis helplingvon perfektan kaj grandiozan, por ke la homoj de plej diversaj nacioj pli facile unuigu, por sukcesigi, ke ili reciproke sin pli bone komprenu kaj sekve pli humane konduku unu kontraŭ alia, kun la alta celo per tio atingi la efektivan mondpacon. Tamen post du mondmilitoj ni bedaŭrinde devas konstati, ke la mondo estas dividita en diversaj partioj, kiuj spite ĉiaj klopodoj faritaj kaj farataj, sin reciproke ne komprenas, kio siavice kaŭzas konfliktojn, enhavantajn minacojn por eksplodo de nova mondskala katastrofo.

Ni en Nederlando kaj precipe ni en Amsterdam spertis dum kvin jaroj da okupado proprakorpe kio signifas, se oni per kruelaj rimedoj prirabas nin de la plej elementaj liberaj rajtoj, konkeritaj en pena lukto en la daŭro de multaj jarcentoj. Nia lando ĉiam staris en la antaŭa vico de la popoloj, kiuj alcelis internacian fratiĝon. Pro tio por ni ne estas malfacile havi ĝustan komprenon pri la merito de internacia helplingvo, kiu plifaciligas la rilatojn inter la homoj de la tuta terglobo.

Esperanto, la grandioza kreaĵo de doktoro Zamenhof, pruviĝis la unika instrumento. Tamen la posedo de ĉi tiu instrumento per

## Ĉu Plzen aŭ Parizo?

Voĉdono devis okazi pri la demando ĉu ni en 1949a kongresos en Plzen (Ĉeĥoslovakio) ĉu en Parizo. La rezulto de la voĉdono estis, ke 274 k-doĵ esprimis sin por Parizo, 159 k-doĵ por Plzen, 4 k-doĵ montriĝis neŭtralaj kaj 5 voĉdoniloj estis senvaloraj. Parizo do estos nia kongresurbo en 1949a.

## Filmo kaj dancoj

„De Amsterdam al Batavia” nomiĝis la filmo, kiun hieraŭvespere prezentis al ni k-do Thien. Kiam la programo komenciĝis la salono de „Bellevue” estis plenplena. Fremdaj landoj pasis preter niaj okuloj kaj ĉiuj rigardantoj sopiris iam viziti tiujn landojn. K-do Thien donis klarigojn dum la filmprezentado.

Post la paŭzo atendis nin bela surprizo. La kelneroj venis, forportis la seĝojn kaj ni havis okazon por danci. Granda ĝojo ekregis. Bedaŭrinde ni ne povis resti dum la dancado, ĉar atendis nin nia laboro por „La Voĉo de l' Kongreso”, sed ni jam estis konstatintaj, ke ĉio iris glate.

si mem ne sufiĉas. Krom tio estas necese, ke ni posedu la liberecon por malkaŝe esprimi niajn sentojn kaj konvinkon tiel parole kiel skribe. Ĉi tio estis la celo, kiu inspiris doktoron Zamenhof al la genia ideo, kiun li korigis en Esperanto.

Ni ĝojas povante kunigi la inaŭguron de ĉi tiu stratnomo honore al la kreinto de Esperanto kun la dudek unua Esperanto-kongreso internacia, kiu okazas en la libera urbo Amsterdam, la ĉefurbo de libera Nederlando. En tiu senco mi invitas vin, sinjoro prezidanto de tiu ĉi kongreso plenumi la ceremonion kaj doni al ĉi tiu strato la nomon, kiu ankaŭ por Amsterdam estu simbolo de la internacia sopiro al paco kaj libereco”.

Post ĉi tiu parolado de la skabeno en bone prononcita lingvo, k-do Jacobson forigis la tukon, kiu ankoraŭ kovris la nomtabulon kaj jen legiĝis: Zamenhofstrato. Spontane ni ekkantis: En la mondon venis nova sento... K-do Faulhaber nome de ni ĉiuj dankis la urbestaron kaj la urbkonsilantaron pro iliaj decido.

Ankaŭ Amsterdam akiris sian Zamenhofstraton. Kiu urbo sekvas?

Post la inaŭguro okazis diversaj fakaj kunsidoj.

## Junularrenkontiĝo

Antaŭ nia SAT-kongreso okazis tutmonda junularrenkontiĝo en Leersum, Nederlando. Ĉi tiu renkontiĝo grave kontribuis al la sukceso de nia 21a. Dum la kampadsemajno okazis viglaj diskutoj kaj ĉe ĉiuj interparoloj SAT havis la plenan intereson de la partoprenantoj. Estas preskaŭ certe, ke la estonteca kadro de SAT grandparte konsistas el la diversnaciaj partoprenintoj al la tendumado en Leersum. Bonan sennaciecan sferon en libera kampo, meze de belega naturo, lernigajn ekskursojn kaj prelegojn, diskutojn kaj ludojn, jen kion oni prezentis en Leersum por eduki junajn Esperantistojn al konsciaj SAT-membroj. Ju-Ko, la junulargrupo de la nederlanda Asocio de Laboristaj Esperantistoj, organizis la renkontiĝon. Subtenu Ju-Kol

# Kiuj ne ĉeestis

*K-do Neergaard, Danio: Kontraŭ dogmoj, por komprenemo. Kontraŭ sektismo, por solidareco. Kune ni staras, disigite ni falas. Vivu SAT!*

*K-do Burda Rudolf, Ĉeĥoslovakio: . . . . tutkore salutas la partoprenantojn al la kongreso en Amsterdam.*

*K-do Wagner, Germanio: Kredu, ke ankaŭ germanaj SAT-anoj plenumos la taskon, kiun ni havas laŭ la statuto de SAT, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. . . . Mi dankegas por la ĉiama livero de „Sennaciulo” kaj „SAT-amikaro”.*

*Aŭstria Laborista Esperantistaro: Ni nur ege bedaŭras, ke por ni, aŭstroj, spite al ĉiuj penadoj, estas maleble partopreni.*

*K-do Ludwig, Aŭstrio: Ni esperas, ke la ĉi jara SAT-kongreso vere kunhelpos prosperigi la laboristan Esperantomovadon tutmondan.*

*K-do v. d. Heid, Germanio: Ne ebligis mia ĉeesto, revo restis revo.*

*K-do Th. Weder, Ameriko: Esperante, ke la spirito de la plej altaj socialistaj aspiroj regos dum la kongreso kaj alportos bonajn fruktojn tiel por SAT kiel por la efektivigo de l' socialismo. . .*

*SAT-rondo München, Germanio: Plifirmigu la sennaciecan pensadon en la koroj de la homoj kaj ne forgesu, ke ni restintaj hejme, rigardas atenteme al vi kaj al via laboro por niaj idealoj.*

*K-do Janecka, Aŭstrio: Ni neniam laciĝas varbi kaj denove varbi por niaj celoj.*

*Finnlanda Laborista Esperanto Asocio: La signifo kaj bezoneco de la lingvo Esperanto, precipe kiel komuna lingvo de la tutmonda laboristaro, estas ĉiam pli klare rekonataj kaj kune kun ĉi tio la ŝancoj prezentiĝas al ni tre favoraj.*

*Esperantista Grupo „Konkordo”, Milano, Italio: . . . . plej sincerajn bondezirojn, triumfan sukceson al la 21a kongreso de SAT.*

*Trondhejmaj SAT-anoj, Norvegio: Al la 21a, ĝiaj aranĝintoj kaj partoprenantoj, nia grupo sendas bondezirojn kaj esprimojn de simpatio kaj solidareco. Ni esperas, ke via laboro — gekamaradoj — fariĝu fruktodona, ne nur je bono al nia SAT-movado, sed por la tutmonda laboristaro. Montru per viaj agoj, per viaj intertraktoj, ke en kongreso de SAT-anoj la atmosfero estas pura kaj neinfektita de la nuntempa malpacemo. Estu ĉiuj kore salutataj de la Trondhejmaj SAT-anoj.*

*K-do Neumann, Germanio: La nuna tempo estas altgraveda de krizoj minacantaj la resaniĝon de la socia vivo de la popoloj tutmondaj. Des pli necesas nia batalo por senklasa sennacieca sociordo, kiu sole garantias senkrizan pacan kunvivadon de ĉiuj popoloj en la mondo.*

# Vorto kaj penso

**En la unua kunsido de nia kongreso prof. dr G. Mannoury salutis nin per jena konsiderinda parolado:**

Mi dankas la kongresan komitaton por la permeso diri kelkajn vortojn pri temo, kiu ĉiam varme interesis min, nome pri la rilato inter vorto kaj penso ĝenerale kaj pri la rolo kiun Esperanto plenumas en la evoluo de ĉi tiu interrilato speciale, rolo ne nur kiel internacia komunikilo, sed ankaŭ kiel individua kaj amasa pensilo. Mi tute ne akceptas la ofte defenditan opinion, ke neniu pensado estus ebla sen helpo de la vortlingvo: la bazo de nia spirita vivo kuŝas pli profunde ol tiu de niaj konversacioj aŭ babiloj, kaj la vorto ne estas patrino, sed ĝi estas filino de la penso.

Sed aliflanke ne estas mirige, ke tiu filino povas esti kaj devas esti utilega helpistino de sia patrino, aŭ alivorte: ke la riĉeco de nia lingvo multe kontribuas al la riĉeco de nia penso. Tamen la vera riĉeco de ia lingvo dependas ne de la nombro de ĝiaj vortoj, sed de iliaj uzebleco kaj taŭgeco por esprimi niajn ideojn kaj niajn intencojn, kaj en tiu senco laŭ nia firma konvinko Esperanto meritas la nomon de la plej riĉa lingvo ekzistanta en la hodiaŭa epoko. Kaj tio pro du kialoj: unue pro tio, ke en la artfarita, t.e. artkulturita miklingvo Esperanto la vortsignifoj estas pli precizaj kaj pli unusencaj ol en ia tiel nomata „natura”, t.e. nekulturita lingvo, kaj due pro tio, ke la esperanta konstruprincipo de libera kunigado de vortradikoj kun vortsufiksoj kaj vortprefiksoj entenas la eblecon de senlima kreado de novaj interrilatrimedoj. Sufiksoj kiel -igi kaj -iĝi, -ajo kaj -eco, prefiksoj kiel ne- aŭ mal-, k.t.p. k.t.p., enhavas sugestian povon racie direkti la pensadon de ideoj kaj faciligas la formadon de klare difinitaj konceptoj kaj firme bazitaj konkludoj. Estas tiuj ĉi ecoj, kiuj faras Esperanton vera „vortfabriko”, kiel nomis ĝin la bonkonata pastro Andreo Ĉeh.

Mi ne celas ĉi tie preparoli detalojn, sed unu rimarkon mi ne povas prisilenti, nome tiun, ke la menciitaj fundamentaj principoj de la esperanta konstruo montriĝas multvaloraj ne nur por la scienca kaj filozofia progreso, sed eble pli multvaloraj por la racia, la politika kaj la socia evoluo de la estonta homaro. Mi dankas vin.

Bonan vojaĝon kaj ĝis revido en

## Parizo

la urbo de nia SAT-kongreso 1949a.

## Nombro de aliĝintoj

Aŭstrio	45
Anglio	62
Argentino	1
Belgio	9
Brazilio	2
Bulgario	1
Danio	145
Finnlando	2
Francio	234
Hispanio	1
Hungario	1
Germanio	140
Jugoslavio	2
Italio	2
Nederlando	711
Norvegio	5
Polio	3
Svedio	57
Svisio	6
Usono	1
Ĉeĥoslovakio	8
Entute	1438

Ĉar niaj germanaj k-doĵ ne povis akiri permeson viziti la kongreson, la nombro de partoprenantoj estis iom malpli alta ol la nombro de aliĝintoj.

## Oficiala akcepto

Lundon, la duan de aŭgusto, okazis en la Urba Muzeo la oficiala akcepto de nia kongreso fare de la urbestro, mr Arn. J. d'Ailly. La urbestro estis akompanata de kelkaj skabenoj kaj pluraj urbaj konsilantaranoj. Regis tre societa sfero. Antaŭe parolis la urbestro, poste niaj k-doĵ Bannier kaj Faulhaber. La urbestro deziris, ke nia kongreso atribuos al la disvastiĝo de nia lingvo. La oficialaj personoj montris grandan interesiĝon pri Esperanto. Ĉeestis proksimume 300 gekamaradoj.

## Kiom skribema oni estis!

*Forsenditaj poŝtaĵoj dum la kongreso.*

Leteroj enlandaj	118
Leteroj eksterlandaj	190
Poŝtkartoj enlandaj	461
Poŝtkartoj eksterlandaj	2069
Presajoj (kartoj) enlandaj	2632
Preŝajoj (kartoj) eksterlandaj	2715

Kune . . . . . 8185  
Ĉi tiuj nombroj plialtiĝis post malplenigo de la kongresa poŝkesto okazinta hodiaŭmatene, sed kies rezultato ni ankoraŭ ne sciis antaŭ la preso de ĉi tiu numero.

Venditaj poŝtmarkoj (escepte de „somermarkoj” f 732.—

Venditaj „somermarkoj” f 250.—